

BONA ESPERO


Rundbrief für die Freunde, Förderer
und Mitglieder des Fördervereins
"Bona Espero" e. V.

Cirkulero por amikoj, membroj kaj subtenantoj
de BE

n-ro 27

Decembro 1989

Ktoj: Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 Kto-nr. 900 826 BONA ESPERO
Postgiro-Amt Dortmund, BLZ 440 100 46 Kto-nr. 2033 99-465



Adarci diplomiĝos

deziru sukceson!

Kiu ne konas Adarci, la plej malnovan infanon en Bona Espero? Malnova, ne maljuna, ĉar nur 19jara! De multaj bildoj kaj diapozitivoj ŝi alridas nin, hobiaj kaj profesiaj filmistoj scias ruze utiligi ŝian naturtalenton. Vizitantoj profitas de ŝia lingvoscio, kunloĝantoj de ŝiaj multaj kapabloj. Elementan lernejon ŝi frekventis en BE, daŭrigan en Alto Paraiso. Tiam sekvis la studjaroj en Brasilia. Kaj nun ŝi diplomiĝos! Karavano el BE = Ĉiuj lernantoj de la 4a kaj 5a klasoj veturos la 23an de decembro al Brasilia por ĉeesti. La freŝan agrarteknikistinon oni tiam triumfe akompanos hejmen por festi la sukceson kaj Kristnaskon!

"Dum Kristnasko alvenos multaj volontuloj," skribis Ursula Grattapaglia. "Ni intencas planti etan arbaron de eŭkaliptoj kaj plurajn aliajn speciojn tre interesajn. En oktobro ni pretigis la fundamenton de la nova deponejo, 90 m², kaj nun en novembro ni konstruas la murojn. La tegmento kuŝas jam muntopreta, samspeca kiel sur la nova domo. Nia infanaro tute ne faras problemojn. Ni havas la grandan helpon de Dona Neusa, unu el la fondintinoj de BE antaŭ 32 jaroj. Ŝi instruas posttagmeze al ĉiuj infanoj kudri. En la salono de la nova domo staras tri kudromaŝinoj, kie ili kudras jupojn kaj bluzojn kaj eĉ riparas la pantalonojn de niaj knabaĉoj.....

Adarci macht ihr Examen

drückt ihr den Daumen

Wer kennt Adarci nicht? Sie ist am längsten in Bona Espero, dabei erst ganze 19 Jahre alt. Auf vielen Bildern und Diapositiven lacht sie uns an. Hobby- und Profi-Filmer wissen geschickt ihr Naturtalent zu nutzen. Besucher profitieren von ihrem Sprachtalent, die Hausbewohner von ihren vielen anderen Fähigkeiten. Sie hat die Grundschule in BE, die weiterführende in Alto Paraiso besucht. Dann folgte das Studium in Brasilia und nun wird sie examiniert. Eine Karawane aus BE = alle Schüler der 4. und 5. Klasse fahren am 23. Dezember nach Brasilia um dabei zu sein. Die frische Agrartechnikerin wird man dann im Triumph nach Hause begleiten um den Erfolg und das Weihnachtsfest zu feiern!

"Weihnachten werden viele Helfer kommen, schreibt Ursula Grattapaglia. "Wir wollen einen kleinen Wald anpflanzen mit Eukalyptusbäumen und anderen interessanten Sorten. Im Oktober haben wir das Fundament des neuen Speichers, 90 m², gemauert und jetzt im November ziehen wir die Wände hoch. Das Dach ist schon montagefertig, von der gleichen Art, wie wir es auf dem neuen Haus haben. Unsere Kinder machen gar keine Probleme. Eine große Hilfe ist jetzt Dona Neusa, eine der Gründerinnen von BE vor 32 Jahren. Sie bringt nachmittags allen Kindern das Nähen bei. In der Halle des neuen Hauses stehen 3 Nähmaschinen, auf denen sie Röcke und Blusen nähen und sogar die Hosen der Jungen flicken.

Resp.: Margret Brandenburg
Brinker Damm 24 D-4404 TELGTE



Komisiono el la Socia Servo de la Brazila Stato, kiu la 1an de nov. vizitis nin, esprimis apartan kontenton pri la vigleco reganta en BE. La komisionanoj rekomendis aldoni al la normala instruplano kursojn pri kudrado, dommastrumado, kuirado kaj bakado, ĝardenkulturado kaj lignoprilaborado. Sed ĉion tian niaj infanoj jam delonge lernas. Tiu institucio subvenciis nian laboron en 1988. En 1989 la unua partopago venis en junio kaj la dua en oktobro, kiam la alta inflacio jam estis formangiinta 80% de la sumo. Tamen, ni neniam interrompas nian laboron, kontraŭe ni povis akcepti pli da infanoj, pro la helpo de via grupo Münster."

Am 1. Nov. besuchte uns eine Kommission des staatlichen Sozialdienstes, die besonders angetan waren von der Aktivität in BE. Die Mitglieder empfahlen zusätzlich zum normalen Stundenplan Kurse in Nähen, Haushaltsführung, Kochen und Backen, Gartenarbeit und Holzbearbeitung durchzuführen. Das alles lernen unsere Kinder ja schon lange. Diese Institution hat unsere Arbeit seit 1988 unterstützt. 1989 kam die erste Teilzahlung im Juni und die zweite im Oktober, als die hohe Inflationsrate die Summe um 80% abgewertet hatte. Dennoch, wir werden unsere Arbeit nie unterbrechen, im Gegenteil, wir haben sogar jetzt mehr Kinder im Haus als je zuvor, dank' der Hilfe Eurer Gruppe in Münster."

Fakte 'nia grupo en Münster' eĉ havas membrojn en la urbo, kvankam la plej multaj loĝas dise en la tuta Federacia Respubliko, en Svedio, Danlando, Nederlando, Belgio, Francio, Svislando kaj eĉ sur la Kanariaj Insuloj. Pro tio dum nia ĵarĉefkunveno ĉeestis nur dekduo da membroj, kiuj reelektis Margret Brandenburg, prezidantino, Ursula Schrapp, kasistino kaj Erna Schweins sekretariino. Henriette Otto, multjara vicprezidantino, ne plu kandidatis. Sian taskon plenumas nun Thea Retzlaff kaj ni povas daŭrigi la bonan tradicion de nur-virina estraro. La kaskontrolo pere de Hedwig Fischer kaj Willi Brandenburg plene malsarĝis la kasistinon U. Schrapp. Ŝi atentigis en sia raporto, ke ĉiujn pagojn al la societo oni 100% transdonas aŭ ĝiras al Bona Espero. Ceteraj elspezoj aperantaj en kasraportoj estas donacoj.

Unsere 'Gruppe in Münster' hat sogar Mitglieder in der Stadt, obwohl die meisten verteilt in der ganzen BRD, in Schweden, Dänemark, Niederlande, Belgien, Frankreich, der Schweiz, ja sogar auf den Kanarischen Inseln wohnen. Deswegen waren bei der Jahreshauptversammlung nur ein Dutzend Mitglieder, die Margret Brandenburg als Vorsitzende Ursula Schrapp als Kassiererin und Erna Schweins als Schriftführerin wiedergewählt haben. Die langjährige stellvertretende Vorsitzende Henriette Otto kandidierte nicht wieder. Ihre Aufgabe übernahm Thea Retzlaff, so daß die gute Tradition eines weiblichen Vorstandes fortgesetzt wird. Die Kassenkontrolle durch Hedwig Fischer und Willi Brandenburg entlastete die Kassiererin U. Schrapp. Sie wies in ihrem Bericht ausdrücklich darauf hin, daß alle Zahlungen an den Verein zu 100% an BE weitergeleitet werden. Alle übrigen Ausgaben, die im Kassenbericht erscheinen, sind Spenden.

Vi trovas aldone freŝpresitan ĝirilon por vi, aŭ, se vi ne bezonas ĝin, por alia bonvolulo.

Vi trovas ankaŭ vian kvitancon por pagoj en 1989. Se vi ne trovas ĝin - ĉu povus esti, ke vi forgesis la bonesperanojn?

Vi trovas ĉefe originalan desegnaĵon el la lernejo de Bona Espero, de Maria, Amanda, Lucia, Jilmar aŭ iu alia. Ĝi estu esprimo de danko kaj signo de amikeco inter ni aĝaj eŭropanoj kaj la juna generacio en BE

Sie finden diesmal ein frischgedrucktes Überweisungsformular, für Sie oder einen anderen Gutwilligen.

Sie finden auch Ihre Quittung für Zahlungen im Jahr 1989; wenn nicht, könnte es sein, daß Sie die Bonesperaner vergessen haben?

Sie finden hauptsächlich eine Originalzeichnung aus der Schule von Bona Esper von Maria, Amanda, Lucia, Jilmar oder einem anderen. Sie soll Ausdruck des Dankes und Zeichen der Freundschaft sein zwischen uns alten Europäern und der jungen Generation in BONA ESPERO